
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 2 (839) 2003 ✪



Vaclav LAMR

# Jesuo Kristo estas Savanto de la mondo

**PASKO ✪ EKOLOGIO ✪ RAPORTOJ**

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto:** Jacques Tuinder
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
🖳 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els van Dijk-Kuperus
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
🖳 j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried Krüger
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
🖳 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

**Redaktoro:** Philippe Cousson
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21;
🖳 diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:**
Eldonejo HEJME Kazimierz Leja
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+4832 2650038; 🖳 esperanto@hejme.e-tools.pl


## ENHAVTABELO


27 La tradicioj de homoj: kiam mortis Jesuo?
29 Kelkaj pensoj pri Jesuo kiam li estis ironta al la morto
32 Ĉu oni rajtas taksi kristanismon kontraŭekologia?
36 Nia mondo en amplekso draste reduktita
37 Diversaj aktualaĵoj
40 Sekretaria jarraporto pri la jaro 2002
43 Financa raporto de la Kasisto
46 Raporto de la sveda sekcio de KELI
47 Adiaŭaj vortoj pri niaj Forpasintoj


## REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj,

Dum la kristanoj celebras kaj rememoras la morton kaj releviĝon de nia Sinjoro, estas en pluraj lokoj de nia tero homoj, kiuj suferas pro milito, ĉu interna, ĉu de-ekstera. Estas ankaŭ landoj, kiuj ĉu nove ĉu delonge vivas en ĥaoso.

Oni povas facile diri: ni iru kaj helpu, tiel atestante pri nia fido, sed tio fariĝas pli malfacila kiam la kaŭzo de tio ĝuste estas kristanoj.

Se mi parolas pri la sorto de la planedo mem kiu sopiras (Romanoj 8: 22), ankaŭ la kaŭzantoj estas ĉefe kristanoj.

Feliĉe, Kristo savas, ne la kristanoj.

Philippe Cousson



# LA TRADICIOJ DE HOMOJ: KIAM MORTIS JESUO?

Marko rakontas al ni (7:13) ke Jesuo diris al la Fariseoj kaj la skribistoj ke ili estas „...vantigant[aj] la vorton de Dio per via tradicio, kiun vi transdonis; kaj multajn tiajn aferojn vi faras". La mesaĝo celas ankaŭ nin. Tradicio neniam devas anstataŭigi la Vorton de Dio, sed tio okazas.

Unu tradicio kiu ĉiam ĝenis min estas ke mi ne povas kunmeti Jesuon tri tagojn en la tombo kune kun la tradicia Vendredo, Sabato kaj Dimanĉo, speciale sciante ke Jesuo ne estis enterigita ĝis malfrua Vendredo kaj leviĝis frue en la Dimanĉa mateno. La Judoj konsideras ke la tagoj komenciĝas kaj finiĝas je la sunsubiro laŭ Genezo 1:5b kaj sekvantaj. („Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago".) Tio signifas ke Vendreda vespero estas efektive Sabato kaj Sabata vespero estus la komenco de Dimanĉo aŭ tuto de unu kaj duono da tagoj. En Marko 8:31 ni legas: „Kaj li [Jesuo] komencis instrui al ili, ke la Filo de homo devas multe suferi, kaj esti rifuzita de la pliaĝuloj kaj la ĉefpastroj kaj la skribistoj, kaj esti mortigita, kaj post tri tagoj releviĝi".

Jesuo ankaŭ diris al liaj disĉiploj (Mateo 12:40): „ĉar kiel Jona estis tri tagojn kaj tri noktojn en la ventro de la marmonstro, tiel la Filo de homo estos tri tagojn kaj tri noktojn en la koro de la tero". „Tri tagoj kaj tri noktoj" estas pli ekzakta ol „tri tagoj", tial la kutima klarigo ke Vendredo, Sabato kaj Dimanĉo estas tri tagoj ne kongruas kun la Sanktaj Skriboj.

Aludante al Jona 1:17 ni lernas ke „...la Eternulo pretigis grandan fiŝon, ke ĝi englutu Jonan; kaj Jona restis en la interno de la fiŝo dum tri tagoj kaj tri noktoj". La „tri tagoj kaj tri noktoj" citita de Mateo certe kongruas kun la teksto en Jona.

Nu, kiel eblas havi tri tutajn tagojn kaj tri tutajn noktojn kaj montri ke la nuntempa tradicio malpravas?

Ĉar bildo valoras mil vortojn, bonvolu meti nuntempan kalendaron antaŭ vi. Komencante je Mardo (por sekvi la Judan temp-tradicion tiel kiel ni notis je la komenco de ĉi tiu artikolo) kaj apartigi ĉiun tagon ĝis Dimanĉo per diagonala linio de la malsupra, maldekstra angulo ĝis la supra, dekstra angulo. Skribu en la supran, maldekstran sekcion „mateno" kaj la malsupran, dekstran parton „vespero". (Nia ilustraĵo uzas la Judan metodon, sed komencante je tuta Mardo liveras la saman rezulton.)

Komencante je Marko 14:12-17 (Luko 22:7-13 similas) ni legas: „Kaj en la unua tago de la macoj, kiam oni buĉis la Paskon, liaj disĉiploj diris al li: Kien vi volas, ke ni iru, kaj pretigu, por ke vi manĝu la Paskon? Kaj li sendis du el siaj disĉiploj, kaj diris al ili: Iru en la urbon, kaj vin renkontos viro, portanta kruĉon da akvo; lin sekvu, kaj kien li eniros, tie diru al la domomastro: La Majstro diras: Kie estas mia gastoĉambro, en kiu mi manĝos la Paskon kun miaj disĉiploj? Kaj li mem montros al vi grandan supran ĉambron, prete aranĝitan; kaj tie vi pretigu por ni. Kaj foriris la disĉiploj kaj iris en la urbon, kaj trovis tiel, kiel li diris al ili; kaj ili pretigis la Paskon.

Kaj kiam vesperiĝis [estas nun Mer-

kredo laŭ la Juda kalkulado], li venis kun la dek du" kaj ili manĝis la Paskan manĝon, kiun ni nomas la Finan Manĝon. Post la manĝo ili iris al la Ĝardeno de Getsemane, Jesuo estis malliberigita, juĝita kaj krucumita. Ĉio okazis dum la tago, kiun Judoj konsideris Merkredo, la tago de preparado, kiu antaŭas la Paskon.

En Johano 19:31 ni legas: „La Judoj, ĉar estis la Preparado, por ke la korpoj ne restadu sur la krucoj dum la sabato (ĉar la tago de tiu sabato estis granda tago), petis Pilaton, ke oni rompu iliajn krurojn, kaj forportu ilin".

Estas iom facile kompreni ke tradicio preteratentas la fakton ke „tiu sabato estis granda tago" kaj ne ordinara Sabato. Estis „granda tago", estis Pasko kiu ne okazis Sabate (tio estas kutima, negranda Sabato), sed unu kiu komentis Ĵaŭdo vespero [Merkreda vespero laŭ nia tempo, sed kion ni konsideras Ĵaŭda mateno].

Ni povas legi pri la sama okazintaĵo en Marko 15:42-43: „Kaj kiam jam vesperiĝis, pro tio, ke estas la Preparado, tio estas, la tago antaŭ sabato, venis Jozef el Arimateo, honorinda konsilanto, kiu mem atendadis la regnon de Dio; kaj li kuraĝe eniris al Pilato, kaj petis la korpon de Jesuo". Estas Merkredo ĵus antaŭ la vespero tiam kiam Ĵaŭdo (Pasko, „granda tago") komenciĝos.

Jesuo enteriĝis je la fino de Merkredo, tiam Ĵaŭdo (kaj la Pasko) komenciĝas. La „granda tago" (Pasko) estas la unua tago kiam Jesuo estas en la tombo. La unua tuta tago de la enterigo de Jesuo finas Ĵaŭde vespere tiam kiam Vendredo kaj la dua tago de enterigo komenciĝis. Vendredo (kaj la dua tago) finas je nia Vendreda vespero kaj Sabato (ordinara Sabato kaj la tria tago) komenciĝas.

La fino de la tria tago (ordinara Sabato) estas nia Sabata vespero. Estas tiam kiam la unua tago de la semajno komenciĝas. Legu kion Marko registris (16:1-3) kaj daŭre memoru ke la komenciĝo de la Juda „tago" estas nokto al ni.

„Kaj kiam la sabato jam pasis, Maria Magdalena, kaj Maria, la patrino de Jakobo, kaj Salome aĉetis aromaĵojn, por ke ili iru kaj ŝmiru lin. Kaj tre frue en la unua tago de la semajno ili venis al la tombo, kiam la suno ĵus leviĝis. Kaj ili diris inter si: Kiu derulos por ni la ŝtonon de la enirejo de la tombo?"

Estas la „unua tago de la semajno" komencante je ni Sabata vespero signifas ke tiam kiam ili venis „al la tombo, kiam la suno ĵus leviĝis", ili alvenis je nia Dimanĉa mateno kaj Jesuo jam leviĝis.

La „tri tagoj kaj tri noktoj" estis vere plenumitaj.

La graveco pri Jesuo efektive estinta en la tombo tri tutajn tagojn (anstataŭ malpli ol du) restas en la simpla fakto ke la nuntempa erara kredo kovras kelkajn gravajn faktojn.

Jesuo antaŭdiris ke li estos „mortigita, kaj post tri tagoj releviĝ[os]".

Ni povas diri la nomojn de la tri tagoj (Vendredo, Sabato, kaj Dimanĉo), sed tio ne grandigas la tagon kaj duonon al tri tagoj tiel kiel li antaŭdiris.

Malpli ol la tri tutaj tagoj (tago kaj nokto, ne nur tago aŭ nokto) nuligus la antaŭdiron de Jesuo, io kio ne eblus. Ankaŭ kaŝas la fakton ke Dio la Patro antaŭscias kiam estas la ĝusta tempo por plenumi la antaŭdiron. Se Pasko ne okazis tiam kiam ĝi okazis (inkluzive de la ne menciita tago inter la Sabatoj), tiam ne eblas por Jesuo esti „tri tagojn kaj tri noktojn en la koro de la tero" „kiel Jona estis tri tagojn kaj tri noktojn en la ventro de la marmonstro".

Ne atendu ion ŝanĝi simple pro ĉi tiu klarigo. Se la skribistoj kaj la Fariseoj kroĉpendis al siaj tradicioj spite ke Jesuo diris al ili ke ili malpravis, ni povas certe atendi ke la klerikaro de hodiaŭ faros same. Kaj, sendube, la laikaro ŝafe sekvos.

Ed Harler



# KELKAJ PENSOJ PRI JESUO KIAM LI ESTIS IRONTA AL LA MORTO

Iun tagon, mi aŭskultis kanton, en kiu Jesuo asertis: *Amu vian malamikon kaj faru bonon al via malamanto, benu viajn malbenantojn* kaj *Patro, pardonu, ĉar ili ne scias tion, kion ili faras.* Mi pensas, ke Jesuo kontraŭe al multaj homoj faras mem tion, kion li predikas. Oni devas certe trovi en la lastaj horoj aliajn agojn de Jesuo, kiuj montras lian memdonemon. Tiam mi faris tiun studon en la Biblio, en aprilo 1996.

Kaj irinte iom antaŭen, li falis sur sian vizaĝon, preĝante kaj dirante: *Ho mia Patro, se povas esti, tiu ĉi kaliko pasu for de mi: tamen ne kiel mi volas, sed kiel vi volas* (Mateo 26:39).

Jesuo akceptis morti por ni malgraŭ la antaŭsciata suferado, kiun li devis elteni. Mi scias, ke mi ĉiam preferas eviti la suferon, kiam tio estas ebla.

Kaj dum li ankoraŭ parolis, jen venis Judaso, iu el la dek du; kaj kun li granda homamaso kun glavoj kaj bastonoj venis de la precipaj pastroj kaj pliaĝuloj de la popolo. Kaj lia perfidanto jam aranĝis kun ili signon, dirante: *Kiun mi kisos, tiu estas li: kaptu lin. Kaj tuj veninte al Jesuo, li diris: „Saluton, Rabeno"; kaj kisis lin. Kaj Jesuo diris al li: „Amiko, kial vi venis?* (Mateo 26:47-49).

Jesuo, ne koleras, li ĉiam afable parolas al sia perfindanto. Ĉu tio ne estas mirinda?

Apenaŭ tio estas rimarkebla. Tio ŝajnas tiom ne kompreneble! Li diris al li: „amiko". Li konsideras lin ankoraŭ kiel sian amikon. Jesus demandis lin: „kial vi venis?" Ne, ĉar li ne sciis tion, sed por ke li pensu al tio, kion li estis faranta. Li demandis lin, ĉu vi vere faras tion, kion Dio deziras?" Jesuo volas revenigi Judason en la bonan vojon. Jesuo estas ĉiam preta por pardoni.

Jesuo respondis: *Mi ĵus diris al vi, ke mi estas tiu; se do vi min serĉas, lasu tiujn ĉi foriri": por ke plenumiĝu la vorto, kiun li diris: „El tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi perdis neniun"* (Johano 18: 8-9).

Jesuo tiel parolas, por ke la disĉiploj ne suferu per liaj persekutantoj. Nur li devas esti arestita, ne la disĉiploj.

Kaj kiam tiuj, kiuj ĉirkaŭis lin, vidis, kio estis sekvonta ili diris: *Sinjoro, ĉu ni frapu per glavo? Kaj iu el ili frapis la sklavon de la precipa pastro, kaj detranĉis lian dekstran orelon. Sed Jesuo responde diris: Permesu. Kaj li tuŝis lian orelon kaj sanigis lin* (Luko 22:49-51).

Jesuo ne estas por perforto. Li eĉ resanigis la orelon de la malamiko, kiu venis aresti lin. La koro de Jesuo neniam maldolĉiĝis per la nejustaĵo, kiun oni faris al li. Li ĉiam montras sian amon.

Kial vi min demandas? Demandu

tiujn, kiuj aŭdis, kion mi parolis al ili; ili ja scias, kion mi diris. Kaj kiam li parolis tion, iu el la apude starantaj oficistoj per la manplato frapis Jesuon, dirante: *Ĉu tiel vi respondas al la precipa pastro?" Respondis Jesuo al li: Se mi malbone parolis, atestu pri la malbono: sed se bone, kial vi min frapas?* (Johano 18:21-23).

Jesus ne koleris. Li ne maltrankviliĝis. Li ne diris malafablajn vortojn, li ne frapis lin. Li ne kondamnis lin. Jesuo volis pensigi lin. Tial li petas de la kontraŭstaranto, ke li atestu pri la malbono. Li provas, ke la kontraŭstaranto ekzamenu sin mem por ke li vidu sian eraron.

Petro malkonfesis Jesuon du fojojn.

*Kaj la Sinjoro sin turnis, kaj alrigardis Petron* (Luko 22:61).

Jesuo rigardis Petron por montri, ke li jam estis pardonita. Tio estus tute normala en kutima situacio, sed tiam la judoj estis persekutantaj Jesuon. Jesuo estis tiom memdonema, malegoisma en tiuj malfacilaj cirkonstancoj.

Tiu ĉi diris: *Mi povas detrui la sanktejon de Dio, kaj rekonstrui ĝin en la daŭro de tri tagoj. Kaj la precipa pastro ekstaris, kaj diris al li: Ĉu vi respondas nenion? Kion atestas tiuj kontraŭ vi? Sed Jesuo silentadis* (Mateo 26: 61-63).

Jesuo respondas nenion. Jesuo neniam koleris. Ŝajnas al mi, ke li plenumas la ideon de jena proverbo: *Ne respondu al malsaĝulo laŭ lia malsaĝeco* (Sentencoj 26:4) Kiam li predikis, li klarigis, kial la malsaĝuloj estis malsaĝaj, sed tiam li ne respondis, ĉar eble li konscias, ke ili komprenis tiun vorton, kiun Jesuo diris: *Sinjoro, ni ekrememoras, ke tiu trompanto diris, dum li ankoraŭ vivis: Post tri tagoj, mi restariĝis* (Mateo 27:63) Por tiu, kiu ne volas kompreni, ĉiuj klarigoj estas neutilaj. Do Jesuo estis tre saĝa ne respondi.

*Pilato do reeniris en la palacon, kaj alvokis Jesuon, kaj diris al li: Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj? Jesuo respondis: Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliuloj diris ĝin al vi pri mi? Pilato respondis: Ĉu mi estas Judo? Via propra nacio kaj la precipa pastro transdonis vin al mi; kion vi faris? Jesuo respondis: Mia regno ne estas el tiu ĉi mondo, miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj, sed nun mia regno ne estas el tie ĉi. Pilato demandis lin: Ĉu vi do estas reĝo? Jesuo respondis: Vi diras, ke mi estas reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon. Pilato diris al li: Kio estas la vero?* (Johano 18:33-38).

Jesuo provis evangelizi Pilaton. Kio estas Jesuo por Pilato? Jesuo atestas al Pilato, ke li estas servanto de sia Patro, Dio kaj ke li ĉiam asertas la veron. Jesuo donis belan ateston al Pilato.

Kaj ili kraĉis sur lin, kaj prenis la kanon kaj frapis lian kapon. (Mateo 27:30) Jesuo nek kriis nek koleris, li restis milda.

*Kaj sekvis lin granda amaso de popolo, kaj de virinoj, kiuj ĝemis kaj lamentis pro li. Sed Jesuo, turninte sin al ili, diris: Filinoj de Jerusalemo, ne ploru pro mi, sed ploru pro viaj infanoj. Ĉar jen venas tagoj, kiam oni diros: 'Feliĉaj estas la senfruktulinoj, kaj la ventroj, ne naskintinoj, kaj la mamoj ne nutrintaj.' Tiam oni komencos diri al la montoj: 'Falu sur nin'; kaj al la montetoj: 'Kovru nin'. Ĉar se oni tiel agas al la suka ligno, kiel oni agas al la seka?* (Luko 23:27-32).

En tiu aflikta situacio, Jesuo zorgas pli pri la infanoj, kiuj ne volas sekvi la volon de Dio (seka ligno) ol pri si mem (la suka ligno). *Mi estas en la mano de Dio, sed viaj infanoj ne konas Dion. Do preĝu*



*por ilia savo*, Jesuo asertas.

Kaj Jesuo diris: *Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras* (Luko 23:34) Jen tio estas mirindega! Tion, kion li predikis, li plenumis. Li diris: *Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj, por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo* (Mateo 5:43) Li estas vera propetanto antaŭ Dio, kaj Dio certe plenumis lian preĝon. Tian amon li havis antaŭ siaj malamikoj.

Kaj ankaŭ la rabistoj, kiuj estis krucumitaj kun li tiel same insultis lin (Mateo 27:44).

*Kaj iu el la pendigitaj krimuloj insultis lin, dirante: Ĉu vi ne estas la Kristo? Savu vin kaj nin. Sed la aliulo responde admonis lin, dirante: Ĉu vi eĉ ne timas Dion? Ĉar vi estas en la sama kondamno. Kaj ni ja juste, ĉar ni ricevas rekompencon, meritita pro niaj faroj; sed tiu ĉi faris nenion malbonan. Kaj li diris: Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon. Kaj li diris al li: Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo* (Luko 23:39-43).

Jesuo ne pensis pri la doloregо, kiun li sentis. La du rabistoj mokis lin, tamen Jesuo pardonis al tiu, kiu agnoskis siajn pekojn. Li tuj donis al li la certecon pri lia savo.

*Jesuo, rigardante sian patrinon kaj la apudstarantan disĉiplon, kiun li amis, diris al sia patrino: Virino, jen via filo! Tiam li diris al la disĉiplo: Jen via patrino* (Johano 19:25-27).

En tiu doloriga momento, Jesuo ankoraŭ pensis pri la doloro de sia patrino. Li volis konsoli ŝin pri la maltrovo de sia filo. Jesuo estis vere malegoista.

*Jesuo, sciante, ke ĉio jam finiĝis, por ke plenumiĝu la Skribo, diris: Mi soifas. Kuŝis tie vazo pleno da vinagro; oni do metis spongon, plenigitan per la vinagro, sur hisopon, kaj levis ĝin al lia buŝo* (Johano 19:28-29)

Jesuo klarigis sian bezonon. Li volis doni al iu okazon, fari bonan agon por li. Tiu, kiu trinkigis Jesuon, montras, ke li vere amas Jesuon. Tiel Jesuo repacigis la trinkiganton kun Dio.

Kiam do Jesuo ricevis la vinagron, li diris: *Estas finite* (Johano 19:30).

Jesuo deklaris, ke li faris la volon de Dio. Dirante tion, li montras al la homaro, ke ĝiaj pekoj estas forviŝitaj.

*Kaj kriinte per laŭta voĉo, Jesuo diris: Patro, en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton* (Luko 23:46).

Ĝis la fino Jesuo fidas Dion. Kun aliaj vortoj li diris tion.

Dio benu vin.

Philippe DE VOS

## Karl BUREMO 90-jara!

La 23an de aprilo 2003 Karl BUREMO festis sian 90-jaran festotagon. Al lia hejmo venis 35 personoj.

Kiel reprezentanto de la Sveda sekcio de KELI mi gratulis lin kun bela floro. Pluraj venis de la Esperantoklubo de Jönköping. Li ricevis de ili la saman specon da floroj. De la preĝejo de Ansgarius venis la pastro kun multaj membroj. De la Ekhagpreĝejo venis la pastro kun pluraj estraranoj.

Cetere venis najbaroj kaj geamikoj. La ĉambroj iĝis plenaj de floroj. Private Britta REHM gratulis lin per sendado. Li sentis sin ĝoja kaj danka al Dio, ke estis bona tago.

Arne LUNDKVIST

# ĈU ONI RAJTAS TAKSI KRISTANISMON KONTRAŬEKOLOGIA?

**Kristanaj esperantistoj ĉeestas prelegon de fama priekologia intelektulo[1].**

Ni estas nur kvar ĉar aliaj samideanoj, pridemanditaj, ne sin sentas multe kristanaj kaj, eble, ili jam akiris ioman superecon rilate ĉiuspecan religion aparte rilate kristanismon; jam, oni diras, esperantismo entenas ĉion bonan eventuale ofertitan de kristanismo, kaj des pli purigitan el spuroj de mankoj aŭ misfaroj je kiuj sin makulis laŭlonge de la historio kristanaj doktrino kaj adeptoj; „kaj finfine la ideoj de la preleganto, jam publike konigitaj, akordiĝas kun la niaj. Utilus, male, interveni por apogigi ilin".

Ni estas, do, nur kvar, decidaj sed iom timigitaj. Ni jam konas kaj programojn kaj sugestojn favore al la savogardo de la medio kaj defendo de la naturo, kun kiuj ni ĝenerale konsentas kaj pri kiuj ni pretas kunlabori; estas la bazaj ideoj sur kiuj pretendas sin apogi idealoj, aŭ mondkonceptado, de la preleganto kun kio ni malkonsentas. Ni troviĝas en kinosalono inter proksimume tricent personoj, certe plejparte verduloj kaj mediaktivuloj. Ĉu ni sukcesos interveni kaj efike eksplikі kion ni pensas: ke ĝuste el flanko de kristanismo alvenas apogo al ekologio, ke male misas kiuj grimpas por montri ke sekvantoj de la biblio kaj kristanismo ne ĝuas imunecon antaŭ la devo ne damaĝi la naturon. La preleganto ekas kvietvoĉe laŭdante la publikon „kiu sentas la problemon protektado kaj defendo de la naturo" kaj altiras ĝeneralan atenton, kaj precipe la nian, eksĉitante eble ion da miro en kelkaj, ĉar citas esplicite la papon Johanon Paŭlon la Duan! Pro kia kialo laŭta oponanto de kristanismo aprobe citas kaj laŭdas katolikan papon?

Li diras: „La papo dimanĉon (25-8-2002) senekvivoke deklaris ke nedisigeblas paco kaj justeco de savogardo de la natura medio. Bonŝance fine kristanaj eklezioj eniras en la modernan rekonon pri la neceso respekti kaj defendi la naturon. La interveno de tiu papo signas inviton, eble novaĵon, je granda valoro en la sinteno inter kristanismon kaj la temoj medidefendaj. Espereblas ke tio helpu kristanojn foriri el daŭra sinteno de indiferento".

Tiuĉipunkte la laŭdo al la papo ektransformiĝas al bedaŭro „pro la ĉi-kampe malfruo de la kristanaroj... Ili malfacile povos senvestiĝi kaj forigi tradician ilian biblian antropocentrismon kiu inokulas la pretendon pri ial diferenco je valoro inter la vivaĵoj, kaj instigas homojn sin konduki despote kaj tirane al naturo ilin igante neglektantoj se ne malŝatantoj de tio kio ne estas homa: kaj tiel puŝas ankaŭ al maljusteco kaj perforto inter homoj...".

La publiko ŝajnas konsenti kun la oratoro, kiu hastas informi la publikon ke je ĉiumomento oni rajtas interveni por peti pliajn eksplikojn kaj por, tio eblas certe!, prezenti kompletigojn. Unu el ni ekvenkas hezitojn kiam la oratoro citas la vortojn diritajn, en la didaktika biblia legendo de la diluvo, al Noa: *...ĉio kio moviĝas sur la tero, kaj ĉiuj fiŝoj de la maro... en viajn manojn estas transdonitaj... servu al vi kiel manĝaĵo...* (Gen 9:3). Temas, li konkludas, pri aŭtentika kaj senhezita rajtigo forliberiĝi el aliaj estaĵoj ilin eliminante". Unu el ni, tial, demandas:

„Eble licas estendi vian laŭdan aprobon ankaŭ al aliaj kristanaj eklezioj kies ekumenaj movadoj kune plurfoje esprimis la saman pri ekologio vizion kiel KEK kaj konferencoj kun orientaj kristanoj. Tion premisu,. ĉu ne ŝajnas al la prelegisto ke ĉiuj kulturoj estas antropocentraj je la konstato ke ĉiuj sin servas, senrimorse kaj seninterrompe, je animaloj ktp ĝis ilin mortigi por sin nutri kaj je ĉiuspecaj vivaĵoj por ebligi sian vivon? Laŭ tiu senso ĉu eblas ne esti antropocentraj? Ĉiukaze antropocentrismo, tiu biblia, ne rajtigas aŭ konsentas la masakron de la naturo. Male, el la biblia Genezo (Ĉapitro 2) oni konstruas tiun scenon: estas transigata la kreitaro al la homo por ke li ĉion prizorgu kaj vartu kaj vartu anastataŭ Dio mem: anstataŭante Dion la homo devas imiti tiun ĉi kiu pro kreitara beleco kaj boneco plezuriĝis antaŭ siaj unuopulaj verkoj. Kial, do, ligi antropocentrismon al eluzo kaj misuzo kaj, malplejbone, al rajto detrui? Ĉu tiaspecaj riproĉeblaj sintenoj ne povas naskiĝi, eĉ en la popoloj inspiriĝantaj al la Biblio, el homa egoismo kaj el volo elstari sur la aliaj sendepende, kaj kontraŭ, la biblia doktrino?"

La prelegisto ne hezitas kaj, je sia komforto, citas famajn verkistojn kaj pensistojn[2] kiuj kulpigas la biblian antropocentrismon. Tamen, finresponde, koncedas ke la homa egoismo kaj emo al superrego sur la aliaj kune kun nekorekte komprenita supereco antaŭ la kreitaro povas kunkaŭzi la malpliiĝon de la respekto al naturo, kiu estus nerekte kontraŭita de la biblia antropocentismo".

Ĉipunkte la prelego envojiĝas demonstri ke aliaj religioj, aparte tiuj orientaj, havas pli korektan kaj efikan, aŭ mapli imunecan, rilaton kun la naturo „eble pro tio ke la tipo de posttomba transvivo anoncita kaj komprenigita de tiuj religioj ne tro distanciĝas el la spertoj en naturo mem... dum en kristanismo la transviva stato realiĝas en sfero komplete malsama el la spertoj de tiu natura vivo".

Kaj tie ĉi profitas la okazon la dua esperantisto.

„Se Bibliismo-kristanismo tiom foriĝas el la disvastigo pri uzo respektema al medinaturo kiun ni kristanoj nomas ankaŭ kreitaro, kiel interpreti kaj sterilizi la pakton, ankaŭ se enscenigitan per legenda-didatikaj literaturaj aranĝoj, inter la homo kaj Dio kiam tiu ĉi donacas la ĝardenon por ke la homo *prilaboradu ĝin kaj gardu* (Gen 2:15)? pakto reeĥiĝanta ankaŭ en la imagita dialogo inter Dio kaj Noa tuj post ties eliro el la arkeo (Gen 8)? En la psalmoj, plue, la inspiritaj poetoj instigas, fakte se ne intence, por ke la naturo estu juĝata digna je miro kaj kontemplo; la Apokalipso mem, tre citita pro la priskribitaj detruigaj skuadoj, kontraŭ la naturo oni dirus, taksigas ĝuste tiujn ĉi krimecaj, kvankam simboloj de okazaĵoj en la historio de la homaro pekanta. Kaj ĉu nelegeblas ankaŭ ke la naturo sin ribelos kontraŭ Adam kiu ĝin jam misuzis manĝante de *la arbo de sciado pri bono kaj malbono* kaj konsekvence la homa labora peno fariĝas pli pen-

porta dum la tero kreskigos dornojn kaj pikaĵojn? (Gen 2-3)"

Tekstoj mirindaj certe, laŭ la responda komento de la prelegisto, kiuj certe edukas al amo kaj respekto al la naturo. Tamen necesas distingi la animon de la poetoj aŭ ideologiistoj el ilia konduto kaj el la konduto de la amaso adresita, kiu povas percepti iujn aspektojn de la instrua mesaĝo, ignorante aliajn, same kiel okazis en la lastaj jarcentoj. „Malgraŭ tio mi konsentas kun vi ke tiuj tekstoj meritus ne esti praktike priserĉataj sed aŭspiciataj por pli fruktodonaj rezultoj".

Nun la oratoro invitas konsideri ke la surglobaj zonoj plej poluciitaj estas tiuj setliĝintaj, aŭ influitaj de okcidentanoj, kies plejparte estis eduke kulturitaj de la biblio kaj kristanismo.

La pruvaj kazoj kaj precipe oportunaj tekstoj de orientaj religioj ofertas spacon por ke la tria esperantisto petu parolon.

„Sendepende de la realaj sinteno kaj praktiko de la homoj, konstateblas ke la tekstoj de la Nova Testamento, kiel la evangelioj, plenas je referencoj kaj rilatoj kaj aludoj al naturaj fenomenoj kaj riĉas je observoj kaj komparoj prenitaj el komuna kamparana laboro. Ĉu eblas ke ĉio tio, ĉe la ekkonsciiĝo pri la ekologia problemo, restis senefike en la kristana enkulturiĝo? Kaj tiu liturgie benadi akvon kaj fajron, tiu liturgie nobligi kaj ekzalti naturajn elementojn aŭ faritaĵojn de la homa laboro (pano, vino, oleo...) kaj ilin igi esplicitaj simboloj de la supernaturaj eventoj kaj esprimi per ili teologiajn konceptojn? Kaj la kreda konvinko ke la ununura Difilo fariĝis, kaj restas, preninte el la karno de iu virino, en homaj aspektoj kaj realo kaj iam vivspertis tra naturaj okazaĵoj... Ĉu eblas ke ĉio tio favoras, en la kristano, al indiferento, se ne al damaĝo, pri la medinaturo? Kaj tiu oka Paŭla ĉapitro de la letero al la Romanoj, kie naturo tiom amatas ĝis esti personigita kaj atendanta la elaĉeton ĝuste same kiel la homoj?"

La respondo konstatas ke ne eblas certe ne konsenti kun la senso de tia kristana-bibliaj tekstoj. Konsekve, antaŭ la konduto de la kristanaj popoloj, oni devigatas konkludi ke tiuj ĉi ne multe sin lasas penetri el tiuj inspiroj, ke tiuj ĉi almenaŭ necesas je reviviĝo.

La oratoro pli avancas kaj montras ke bele kaj kuŝe mem navigas tra orientaj filozofioj dum lia lingvaĵo ekŝprucas je panteismaj esprimoj. Al li ŝajnas pli facile allogiĝi al respekto al naturo, kiu devas servi integra al la venontaj generacioj, eĉ ial asimiliĝi al naturo mem, per absorbo de tiuj doktrinoj ol samfari per deismo kiu igas, marŝantaj paralele kaj distinkte, se ne indiferentaj unu al la alia, Dion kaj la naturon, en kiu unu povas ignori la alian; en la panteisma mondvizio tiu divido grincas, eĉ ĝi ne eblas. „Ho se ni estus unu en komuna destino!..."

„Profesoro, estas la kvara esperantisto kiu venkas timidecon, en la mond-konceptado teisma-kreisma nenio malhelpas sin senti kun kaj en naturo kaj partopreni en ĝia destino kaj ĝin prizorgi: Ĉu ne estas skribite ke la Kreinto, ĉe la fino de unuopa kreiva ago de la didaktike fantaziaj ses tagoj, sin turnas kontempli kaj plezuriĝas pri la beleco de sia faritaĵo? Tiu edukcela sinteno de la kreinto ne povas ne influi kaj gvidi la bibliŝatantojn, ekzemple la monaĥejan vivon laŭ la jarcentoj. Ĉu ni neniam provis legi la brevierajn himnojn aŭ ĉeesti liturgian ceremonion de la asertintoj de la moto *Ora et labora* aŭ similaĵojn en diversaj eklezioj? La distingo inter naturo kaj Dio ne malhelpas al la filozofoj kaj mistikuloj de la kristana medio vidi en la unuopulaj kreaĵoj diajn aspektojn aŭ speguliĝojn (nome, eĥoj de la famaj *rationes seminales*). Majstro Eckhart kaj Taulero kaj Sankta Bonaventuro estu, inter senfinaj, ekzemploj. Sur tiu sulko, inter similaĵoj, ĝermas en la animo de Sankta Francisko, la Kantiko de la kreitaĵoj. Ĝuste rilate tiun homon estu permesite rememorigi kion diras la Floretoj de Sankta Francisko, edifa rakontaro naskiĝinta el la popolo jam simpatianta kun la natursentemo de la sanktulo. Iun tagon, post abunda pluvo, la sanktulo vidas vermon strattraire treniĝantan... Por eviti al ĝi la riskon esti tretita, la sanktulo ĝin delikate prenas kaj demetas sur la stratlima herbejo; aŭ ankoraŭ, Francisko aranĝas por ke en la Kristnaska festo ankaŭ la birdoj pepantaj ĉirkaŭe de la romitejo siakomforte perceptu la popolan festadon: pro tio li invitas fratulojn disemi la korton per tritikaj grenoj! Ĉu tio ne estas frukto de la biblia-kristana, poete perceptata de la kristanaj popoloj, naturvizio, hodiaŭ fariĝanta ekologio[3]?

La recito de Floretaj ĉerpaĵoj agrabliĝas ĉe la publiko kiu ekaplaŭdas kune kun la preleganto. Tiu ĉi komentas: „Ne mi povas forgesi ĉion tion, aparte la kantikon de la kreitaro. Oni, tamen, permesu ke, aplaŭdante tion, mi observu ke, almenaŭ je unuavido, iu malpli furioza distingo inter Dio kaj naturo eksĉitus en la homoj pli grandan kunsenton kaj sintonion kun la naturo. Eble Dio perdus ion el siaj sendependeco kaj absoluteco, sed pli facile estus akirata la apudeco al ĝi same kiel tio oni ekprovis okazigi per la dogmo de la Enkarniĝo.

„Rilate la diajn semojn tra la naturo aŭ en la naturo mem, ankaŭ mi ŝatas la mondvizion de A. Osiander kaj G. Galilei kaj kiuj kredis travidi en la kreaĵoj spurojn de la dia menso. Kaj fine mi ne volas juĝiĝi malprovizita je konoj pri la esplora trapensado de aktualaj kristanaj teologoj kiuj, pri la naturo konsiderita en la sfero de la kunvivado kun la homaro, skribas paĝojn belegajn, kiujn ankoraŭ mi estas leganta, tiaj estas J. M. Aubert, Moltmann, Boff kaj aliaj. Ne eblas certe nei ke la kristanoj nun remalkovras tion kio kuŝas en iliaj originaj radikoj, kaj ne eblas ne subskribi, komplezeme, la jam cititajn vortojn de la aktuala papo kaj ĵusaj ekumenaj deklaroj, laŭ kiu nedisigeblas paco kaj justeco kaj konservo de la natura medio".

La prelego tiupunkte daŭras nur konversacie. La kvar eliras el salono dirante unu al aliaj: la interalfronto estis amikeca kaj amikiga, sed kial ni forgesis aldoni ke la kreitaĵoj meritas admiron kaj respekton precipe pro tio ke ili estas, laŭ kristana kompreno, noblaj ŝtupoj al Kreinto?

Zecchin Armando

[1] Estis variinformile anoncite komento pri la ideoj de prof. Marino Niola akuzanta, el diversaj ĵurnaloj, kristanismojn je konstitucia malatento al la neceso ne damaĝi, male protekti, la medinaturon.

[2] Bertrand Russel, Vattimo, Bruno Vogelmann, kaj kulturaj antropologoj kies nomoj forfuĝis.

[3] Inter la ĉeestantoj estas memorigataj nomoj de poetoj kaj sciencistoj de la kristana mond- kaj viv-konceptado: Luzi, Schiller, Manzoni, Newton, Chateaubriand ktp.

## NIA MONDO EN AMPLEKSO DRASTE REDUKTITA

Se ni kapablus redukti la tutmondan enloĝantaron al cento da personoj, tiam ni povus proksimume konkludi al jeno:

Surbaze de la nunaj rilatoj ni renkontus: 52 in- kaj 48 virseksulojn; 70 neblankulojn kaj 30 blankulojn; 57 Azianojn, 21 Eŭropanojn, 14 Amerikanojn kaj 8 Afrikanojn; 30 kristanojn kaj 70 nekristanojn; 89 preferus aliseksan vivkunul(in)on kaj 11 samseksan.

Ses homoj posedus 59% parton de la ekonomia prospero tutmonda kaj ĉiuj el ili loĝus en Usono.

Unu estus preskaŭ mortinta; unu naskiĝonta; unu sekvinta pli altan instruadon; unu posedus komputilon; 80 loĝus en situacio nehominda; 70 estus analfabetaj kaj 50 subnutritaj.

Konsiderante nian mondon el tiel 'kunpremita' perspektivo, ni devus evidente konstati, ke urĝe kaj larĝe necesas akceptado, komprenado kaj edukado.

Ankaŭ la jeno estas pripensinda. Ĉi tiun matenon sana vekiĝinta, vi estas pli benita ol tiu miliono da homoj kiu — pro malsanoj — ne atingos la finon de la sernajno.

Neniam spertinte la danĝerojn de milito, la solecon de prizono, la timegon pro torturado aŭ terurajn dolorojn sekve de malsato, vi pli bonŝancas ol 500 milionoj da homoj en ĉi tiu mondo.

Povante libere viziti preĝejon kaj ĉeesti Diservon sen timo ke aliaj vin ĝenos, arestos, torturos aŭ mortigos, vi pli bonŝancas ol tri miliardoj da homoj en la mondo.

Havante nutraĵojn en la fridujo, vestaĵojn en la ŝranko, tegmenton super la kapo kaj lokon por dormi, vi havas pli da feliĉo ol 75 el 100 surteranoj.

Se vi posedus, monon en bankokonto kaj en la poŝo — aŭ eble eĉ en eluzita ŝtrumpo — tiam vi apartenus al la pinto de 8% el la plej riĉaj homoj.

Multaj dezirus legi ĉi tiun tekston, sed ne estas donita al ili vidpovo. Tri el kvar povus vidi, pli akre vidi aŭ denove vidi, se prezentiĝus helpo flanke de okulspecialisto. Milionoj neniam vidas la miraklon de ĉiutaga sunleviĝo kaj sunsubiro, la kolorojn de la folioj kaj la ridon sur viaj vangoj.

Se vi estas tiom privilegiita, ke vi povas legi ĉi mesaĝon, vi ricevis duoblan benon, ĉar iu proksimulo aŭ malproksimulo memoris vin. Krome vi estas pli benita ol du dikaj miliardoj da homoj, kiuj tute ne kapablas legi. Tial permesu al mi konsili la jenon:

— Tiel laboru, kvazaŭ vi ne bezonus la monon;

— Tiel amu, kvazaŭ neniam oni estus ofendinta vin;

— Tiel dancu, kvazaŭ mankus ĉirkaŭaj rigardantoj;

— Tiel kantu, kvazaŭ forestus atentaj aŭskultantoj;

— Tiel vivu, kvazaŭ estus la ĉielo sur la tero.

Se kie ajn vi havas bonajn geamikojn, ne hezitu dissendi ĉi tiun mesaĝon tra la tuta mondo. Tio estas vere unika maniero por gajigi la tagon de ĉiu ricevonto. Nenio okazos al vi, se vi decidos ne disvastigi ĉi tiun okulmalferman informaĵon. Eble okazos tio, kiam vi sendis ĝin al bona amikino aŭ amiko: ŝi aŭ li povus komenci home vivi dank' al vi!

Mi deziras al vi vivon tre riĉan, feliĉan kai bonŝancan!

septembro 2002

prilaboris: Jacques Tuinder



## Agado en la diocezo Speyer

La episkopuja gazeto de la diocezo Speyer, *„Der Pilger"*, raportis pri la kristnaska agado de la Esperanto-Laborgrupo de la diocezo Speyer. *„Esperanto - das neue Latein der Kirche"* estas la titolo de libro, kiu ĵus estis adresita al ĉiu pastro de nia episkopujo kune kun malgranda lingvo-kurso: donaco de la Esperanto-Laborgrupo de la diocezo Speyer. La celo de la kristnaska agado estas atentigi en tiu rondo de ekleziaj multobligantoj pri Esperanto kaj prezenti la eblojn de senproblema komunikado de fideluloj en la tuta mondo kiel „fascinan vizion".

La libro de d-ro Ulrich Matthias, kiu intertempe aperis ankaŭ en Esperanta, angla kaj rusa versioj, donas enrigardon pri la baza ideo de Esperanto kaj pri la historio de kristanaj Esperanto-unuiĝoj. Ĝi kolektas kaj diskutas argumentojn por kaj kontraŭ Esperanto kiel solvo de la lingvo-problemo ankaŭ interne de la katolika eklezio. Ĝi finiĝas per la vortoj de la episkopo de Hradec Kralove: *„Unu el la plej gravaj fruktoj de la dua vatikana koncilio estas la dialogo kun la mondo. Por tiu dialogo, je nia dispono estas bonega ilo, la internacia lingvo, kiu privilegias neniun kaj diskriminacias neniun.*

*Ni utiligu tiun instrumenton, por realigi la amon de Dio inter la homoj".*

La unua danka respondo venis de la episkopo de Speyer, d-ro Anton Schlembach.

Jen partoj el aliaj leteroj:

— La hodiaŭa poŝto alportis al mi la du verketojn de d-ro Ulrich Matthias, pri kiuj mi elkore ĝojis. Aparte ĝojigis min, ke, laŭ p.127 de la libro, en la rondo de esperantistoj oni okupiĝas ankaŭ pri Edith Stein.

— Koran dankon pro via sendaĵo pri Esperanto. Kun ĝuo mi jam trafoliumis ilin.

— De ĉiam, mi trovis fascina la ideon inventi simplan lingvon, kaj mi ankaŭ miris, ke Esperanto ne trovis pli la disvastiĝo. Sed mi povas ja rigardi min mem: neniam mi serioze prenis tempon por pli detale okupi min pri la lingvo. Eble nun?!

— Mi kunrespondecas pri du paroĥoj. La utiligo de tiu libro verŝajne ne kondukus al pli bona interkompreno (rimarko de Albrecht Kronenberger: Karakteriza por la nuna situacio estas tiu teksto de 75-jara animzorganto en granda eklezia institucio. Laŭ mia kono de tiu kunfrato, ĉi sarkasma rimarko ne direktiĝas kontraŭ Esperanto).

## Seminario en Strasburgo

Gaja rondo de kantemaj esperantistoj renkontiĝis dum la karnevalaj tagoj en Strasburgo. Kvankam la seminario estis preparita tre improvize, pleje laŭ persona invito venis dudeko da personoj al St. Thomas, kie oni estis jam antaŭ unu jaro sub la temo „ADORU". Petr Chrdle el Praha recenzis la libron *ADORU* el la vidpunkto de sperta eldonisto; li trovis nur malgrandajn punktojn pliboniigeblajn. Ernst Leuze sorĉis el la malgranda elektronika orgeno tre originalecan muzikon akompane al la kantoj de la libro. Eĉ la nura aŭskultado de tiuj kontribuoj pravigis la partoprenon. *ADORU* vere estas mirkaklo de kristana Esperanto-literaturo. Kaj post kiam la kompaktdisko *OekuRom* donas al la posedanto de komputilo la eblon aŭdigi la melodiojn, neniu Esperanto-amiko devus rezigni pri tiu libro, kiu estas havebla kontraŭ 19,80 EUR ĉe pastro Eichkorn.

Unuanime oni decidis ripeti la semi-

narion venontjare de la cindra merkredo ĝis la tuj sekva dimanĉo (25–29 februaro 2004), denove en St. Thomas pri la temo *ADORU*. Pastro EICHKORN jam komencas kolekti aliĝojn. La partoprenintoj de la nunjara evento preskaŭ ĉiuj jam decidis reveni. Ĉu ankaŭ vi?

Bernhard EICHKORN

## Rimini

Por la ekumena Esperanto-kongreso en Rimini, 30 aŭgusto — 6 septembro 2003, aliĝis jam pll ol 190 personoj. Lim-dato por aliĝi estas la 30a de junio. Ĝis tiu dato, pastro EICHKORN volonte akceptas novajn aliĝojn.

Adreso:
Bernhard EICHKORN
Romäusring 20
DE-78050 VS-Villingen
bernhard.eichkorn@esperanto.de
tel.: 07721-22073
faks.: 07721-22074

## Infanoj el multaj landoj

Kiel kutime, okazos paralele kun la Universala Kongreso en Gotenburgo aparta internacia aranĝo por infanoj. Jam aliĝis al la Internacia Infana Kongreseto infanoj el Francio, Hungario, Kubo, Norvegio, Rumanio, kaj Svedio, kun interesiĝoj el Britio, Germanio kaj Japanio. Ni havas kvar gvidantojn, du svedlingvaj, kaj bonvenigas pliajn infanojn. Ili estu inter 6 kaj 13-jaraj kaj kapablu paroli Esperanton. Ĝis la 31a de majo partopreno kostas 245 eŭrojn (215 por B-landanoj). Tio inkluzivas loĝigon, ĉiujn manĝojn kaj la programon.

La kongreseto okazos en Lerum, 18 km. for de Gotenburgo, en loko nomita Knappekulla. Ni loĝos en lignaj dometoj ĉirkau centra manĝejo kaj kunvenejo. Tuj apude estas freŝakva lago kun sabla fundo kaj tre pura akvo. Estas plie arbaro kun mirteloj, loko por libere ludi kaj futbal-tereno. Promenaj vojetoj preterpasas vilaoj,, somerdometojn kaj unudu farmbienojn kun bestoj.

Riĉa programo estas en preparo. En Borås, 50 km for, troviĝas granda bestoĝardeno kun elefantoj (elefantido ĵus naskiĝis) ĝirafoj, delfenoj, nordaj bestoj k.t.p. Eblas uzi la buson por ekskurso tien. Oni kunportu manĝon kaj sidu en la parko.

Petu aliĝilojn kaj anoncu aliĝojn al: Stefan MACGILL, Pannonia u. 30, I, 6, HU-1136 Budapest, Hungario <stefan.macgill@galamb.net>. Pagojn direktu al la Centra Oficejo de UEA aŭ via enlanda kongresa peranto. Pliajn informojn kaj elpreseblan aliĝilon oni vidas ĉe la hejmpaĝo de UEA, sub „Kongresoj".

## Memora funebro al David FEATHERSTONE

Eterne konservas la memoron
La ĉiam sopirata
En Die Regno eŝtas nun,
Ĉe orta duonhela lamp' mi dronas en medito,
Disŝovas la kurtenon, ĝemas vane al la lun'.

Senlima eŝtas la ĉielo kaj la voj' peniga,
Eĉ en la nokta song' neatingeblas la korcelo.
Blovu, ho, blovu orienta vento,
La vagantan nuberon blovu al mi en la okcidento!

HSU Chungmu

*Tre estimata Sinjoro Philippe Cousson,*

Antau ĉio, bonvolu akcepti mian sinceran saluton de fora Ĉinio.

Tutkore mi dankas vin, miaj diligentaj gefratoj en Jesuo Kristo, pro tio ke vi klopode kaj regule sendas al mi la gazeton *Dia Regno* senpage dum multaj jaroj.

Jes, jes, mi estas denove naskita. Dank'al la graco de Dio, mi estis savita. Antaŭ du jaroj mi iam suferadis pro mia malsano skvamo-forma ĉelo-kancero je epigloto. „En mia koro mi konservas Vian diron, por ke mi ne peku antau Vi". Mi firme kredas ke la plej taksinda valora trezoro en la mondo estas koro en Amo & Honesto; eĉ se vi situacius en malboneco, do tiam ankoraŭ vin subtenos iu forto.

Al mi iam jam estis danĝere pro malfrue tempa kancero. Sed ankoraŭ kutime mi legas la Sanktan Biblion kaj havis la kuraci-planon, kiun mi mem decidis. Tio estas: Rifuzi operacion! Eviti kemiterapion! Akcepti radioterapion! Nu, nun mi estas preskaŭ tute sana.

En ĉi tiu nova jaro mi transloĝiĝis en mian privatan loĝejon, ne larĝan, sed sufiĉan. Do, mi havas novan adreson.

Mo Zhi-Xiong
Xiang-Xie-Li-She-Xiao-Qu 1-1-601 Shi,
Shen-Long-Street Te-1 Hao, W.E.D.Z.
CN-430056 Wuhan, P.R.CHINA

NDLR: Kiel redaktoro, mi petas pardonon al nia frato, ke lia letero atendis unu plenan jaron antaŭ ol aperi.

## junaamiko.inf.hu

La revuo por lernejanoj kaj komencantoj havas tiun novan, pli klaran hejmpaĝan adreson. La unua paĝo prezentas bazajn informojn pri la gazeto.

La dua paĝo montras la enhavon de la plej freŝa numero, kune kun du au tri eroj plene legeblaj. Kviza paĝo estas la tria. En ĉiu numero de la revuo estas prezentitaj kvizaj demandoj pri kiuj legantoj konkursas en tri aĝgrupoj. En la paĝo oni vidas la nunajn demandojn, respondojn al la antauaj, liston de gajnintoj kaj la regularon. La kvara paĝo prezentas la redakcion kaj la kunlaborantojn, troviĝantaj en dudeko da landoj. Vortlisto de la uzataj 1500 radikoj estas ĉiam konsultebla en la kvina paĝo.

Elŝuteblaj estas du-lingvaj listoj por la angla, finna kaj sveda. La redaktoro bonvenigas ofertojn pretigi la liston en aliaj lingvoj. Aldone aperas gramatika resumo, kun la finaĵoj, prepozicioj kaj afiksoj de Esperanto. Antaŭfine troveblas la (ret)adresoj de perantoj kaj la abonprezoj (la plena tarifo estas 12 EUR por kvar 28-paĝaj numeroj). La lasta paĝo titoliĝas *Solidareco*. Tie legeblas en tabelo junuloj, grupoj au centroj en landoj kie oni volas lerni kaj uzi la lingvon, sed ne havas rimedojn aboni revuojn. Ni tie invitas vin elekti iun el la listo kaj pagi por tiu patronan abonon. Vi estas bonvena gasto al tiu hejmpaĝo!

Stefan MACGILL
Eldonado, ILEI

# SEKRETARIA JARRAPORTO PRI LA JARO 2002

En tiu ĉi eldono de *Dia Regno* vi estas informataj pri la agado de la KELI-membroj. Prilaborinte la raporto mi konstatis ke kristanaj esperantistoj, dise loĝantaj en la mondo, aktive laboras por disvastigi la Dian Vorton kaj Esperanton. Bedaŭrinde malkreskis la nombro de tiaj homoj kaj mi konstatis, ke nia movado tre bezonas pli da estraranoj kaj aktivuloj surloke. Sen novaj respondeculoj ni atingos en la baldaŭa estonteco danĝeran vojon al la fino de nia unuiĝo. Specialaj talentoj por estrara funkcio ne necesas. Novaj ideoj estas tre bonvenaj.

La elektronika poŝto plifaciligis la kontaktojn sed per-poŝtaj leteroj kaj la telefono ankaŭ estis uzitaj. La *Estrara Bulteno* ne plu aperis sed ni uzis la elektronikan poŝton kaj foje la *Dia*-n *Regno*-n Yahoo-grupon. Per tiu ĉi metodo ricevis multaj personoj la saman mesaĝon.

Philippe Cousson renovigis la ttt-paĝon de KELI en la interreto <www.chez.com/keli>.

Kazimierz LEJA en la paĝaro de sia eldonejo <www.hejme.e-tools.pl> enmetis la informon pri *Dia Regno*, kaj la artikolon de Adolf BURKHARDT: „DIA REGNO — historio de Kristana Esperanto-revuo". Mankas ankoraŭ (pagata) spaco, sed baldaŭ estos tie ankaŭ arkivaj numeroj de *DR* en elŝutebla PDF-formato.

Ni esperis eldoni en 2002 la novan Ekumenan Biblion kun la Dua-Kanonaj Libroj en la traduko de Gerrit BERVELING. Bedaŭrinde la afero malrapide antaŭeniris, ĉar la oficialaj instancoj, kiuj ne scipovas Esperanton, devis aprobi la tradukon. (Komence de 2003 la traduko estis oficiale aprobita).

Philippe Cousson (la redaktoro) kaj Kazimierz LEJA (presisto kaj eldonisto) aperigis denove ses fojojn jare, *Dia*-n *Regno*-n.

Ne forgesu ke revuo estas la vizaĝo de unuiĝo kaj ĝi bezonas vian subtenon per artikoloj.

## DISERVOJ

**Nederlando.** Kadre de la „Faulhaber-semajnfino" organizita de Esperanto Nederland en la unua semajnfino de oktobro, okazis edifo en la kunveneja salono de la kongresejo. Ĉeestis 30 kongresanoj de diversaj konfesioj. Jacques TUINDER gvidis.

**Britio.** En Londono okazis monataj Diservoj en la Metodista Preĝejo. Pro la malgrandiĝanta nombro da partoprenantoj ne plu estis uzata la pli granda salono. Oni transiris al malgranda ĉambro. La organizantoj malesperas varbi novajn ĉeestantojn malgraŭ la strebo per reklamo kaj hejmpaĝo verkita de Kevin BOURNE. Eble estos la Diservoj ĉesigitaj en 2003. La 13an de oktobro okazis festa Diservo pro la datreveno de la 90a Diservo en Londono. Gvidis Tom NEIL kaj orgenludis Gregory POULO. En Stoke-on-Trent okazis Ekumena Diservo en la preĝejo de Sankta Petro Enkatena, la 5an de majo. Kadre de la „Aŭtuna Studrondo" en Skotlando estis organizata Diservo en kiu predikis pastro Charles DORNAN.

**Finnlando.** La finnaj KELI-membroj aranĝis matenpreĝon dum la „Vintraj Tagoj" de EAF en Mikkeli, la 24an de februaro kaj kadre de la „Aŭtunaj Tagoj" en Taivalkoski. Estis uzata la nova ekumena kant- kaj preĝlibro „Adoru".

**Svedio.** En Svedio okazis dimanĉa Diservo kadre de la Sveda Esperanto-Kongreso en Västerås, la 3-5an majo. Leif NORDENSTORM predikis kaj oni uzis „Adoru".

**Germanio.** Dum la 79a Germana Esperanto-Kongreso okazis Ekumena Diservo en la Remonstranta preĝejo de Friedrichstadt (18-5-2002). Celebris pastoro Gerrit BERVELING kaj pastro Albrecht KRONENBERGER. Tiun Diservon ankaŭ partoprenis enloĝantoj de la urbo kaj el la ĉirkaŭaĵo.

Ekumenaj Diservoj en Esperanto okazis regule en Speyer kaj Stuttgart. Pri la Diservo kadre de la KELI-kongreso vi jam estis informitaj.

## SEKCIOJ

**NEDERLANDO.** La estraro de la nederlanda sekcio konstatis ke malrapide sed konstante malkreskis la membro-nombro. KUNE estis jam dum pluraj jaroj Kristana Fakgrupo de Esperanto Nederland kaj ni tre bone kunlaboris. Pluraj el niaj membroj aktivis en diversspecaj Esperanto-medioj. Wil VAN GANSWIJK daŭre instruis Esperanton per la interreto. Jacques TUINDER energie gvidis „Evidente". Li batalis kontraŭ ne-necesa blindeco kaj li vojaĝis denove al pluraj malriĉaj landoj. Estraro de KUNE: Els VAN DIJK, sekretario; Gerda DERCKS, kasistino. Jacques TUINDER estis la prezidanto de KELI kaj Els VAN DIJK estis la sekretario.

**RUSIO.** Larisa KUZMENKO el Rusio informis ke la membroj havis grandparte per-leteraj kontaktoj. Ŝi estis la reprezentanto de KELI por Rusio, Bjelorusio, Ukrainio kaj Kazaĥstano. Ok membroj de la klubo „Renaskiĝo" en ŝia loĝloko regule kunvenis. La ekonomia situacio restis malfacila. La membroj de la klubo helpis en Dimanĉaj Lernejoj en la urbo en la loka orfejo kaj al malriĉuloj.

**LITOVIO.** En Litovio aperis „Litovia Kristano" eldonis Erikas LAICONAS. Li raportis en la revuo inter alie pri la ekumena movado en sia lando. Erikas informis pri la modesta laboro de Esperanto Misio. Li korespondis kun korespondantoj en Tanzanio kaj Zimbabwe.

**BRITIO.** En Britio aperis „Kristana Alvoko", la oficiala organo de la KELI-sekcio. Tom NEIL provizore postsekvis Peter kaj Audrey HAYWARD. La jarkunveno okazis en Stoke-on-Trent, la 5an de majo.

Prezidanto: David BISSET; kasisto: Diana RICHARDSON; sekretario: Jean BISSET. Geoffry DOROW estis estrarano de KELI kaj nia kontakto kun la Brita Biblio-Societo. Ni kore dankas lin por lia laboro.

**HUNGARIO.** En Hungario okazis la „Kristana Kongreso"de KELI. Ĝi estis denove bone organizita de la „ora triopo", Éva FARKAS, Irén BAGHI, Elisabetha KASZAB kun helpo de la nepo de Éva, Zoltan SOMHEGYI. Irén BAGHI estis estrarano de KELI.

**GERMANIO.** Pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastro Bernhard EICHKORN denove aperigis plurfoje jare „Ökumenisches Esperanto-Forum" (Ekumena Esperanto-Forumo). La celo estis disvastigi Esperanton inter germanparolantaj kristanoj. La 13an de oktobro estis honorigitaj pastoro Adolf BURKHARDT, Albrecht KRONENBERGER, pastro Bernhard EICHKORN pro la eldono de la kant- kaj preĝlibro „Adoru".

Ili ricevis la Esperanto-Kulturapremion de la urbo Aalen kaj de la FAME-Fondaĵo pro la Internacia Inter-

komprenîgo. La jarkunveno de la sekcio okazis la 20an de majo. Prezidanto: Stefan SASSENBERG; sekretario: Hella LANKA; kasisto: Astrid HANKE. Werner PFENNIG preparis faldfolion pri la Ekumena Esperanto-Ligo. Siegfried KRÜGER estis la kasisto de KELI.

**SVEDIO.** La 16an de februaro kolektiĝis KELI-anoj en Stockholmo kaj fondis la novan sekcion por daŭrigi en pli simpla formo la KELI-agadon en Svedio. Same kiel en Nederlando, la sekcio fariĝis Kristana Sekcio ene de la Sveda Esperanto-Federacio. Prezidanto: Mats LANDFORS; sekretario: Agneta JÄRLSTRÖM; kasisto Arne LUNDKVIST. Poste transprenis la kasistecon Bengt Olof ÅRADSSON. Anstataŭanto: Leif NORDENSTORM. La membro-nombro estis 45. Kelkfoje aperis „Medlemsblad" verkita de Arne LUNDKVIST.

**FINNLANDO.** En Finnlando aperis 4 fojojn la organo de la finna sekcio, verkita de Olavi KANTELE. La printempa kunsido estis aranĝata dum la „Vintraj Tagoj" de EAF, la 23an de marto. La 16an de novembro okazis kunveno en Helsinki. Prezidanto: Olavi KANTELE; kasisto: Soili SALMINEN, vic-prezidanto: Matti PERSONEN.

En marto mi ricevis mallongan raporton el la **DEMOKRATA REPUBLIKO KONGIO.** Ĉefe temis pri financaj kaj ĝeneralaj informoj. Sendis ĝin Leonardo MATONDO nome de la Kristana Esperantista Konga Organizo (KEK). Poste mi ne plu ricevis vivo-signon.

**USONO.** Jerald VEIT estis la reprezentanto en Usono. Estis 9 membroj. Malfrua ricevo de Dia Regno estis problemo (mi plurfoje konstatis ke la usonanoj ricevis per aerpoŝto *Dia*-n REGNO-n pli rapide ol ni en Nederlando). Por plibonigi la senton de ligeco inter la membroj de Usono, ĉiu usona membro ricevis senpage la dumonatan bultenon, eldonita de Jerald, „Kristana Espero". Li ankaŭ prizorgis ĉiuntagan Biblian Vorton en Esperanto en la interreto. „Kristana Espero" estis legebla per la sama medio.


Mi venas al la fino de mia raporto. Bonvolu informi min aŭ la redaktoron se mankas interesaj informoj.

Mi dankas ĉiujn personojn kiuj sendis bultenojn kaj raportojn al mi.

**Estraro de KELI** (inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo).

prezidanto, Jacques TUINDER (2003); redaktoro kaj vic-prezidanto, Philippe COUSSON (2003); sekretario, Els VAN DIJK (2004); kasisto, Siegfried KRÜGER (2005); membroj: Irén BAGHI ( 2003); Adolf BURKHARDT (2003); Bengt Olof ÅRADSSON (2003); Pavel POLNICKÝ (2003); Britta REHM (2004); Geoffrey DOROW (2003); Zoltan SOMHEGYI (2004).

Els VAN DIJK



*La 8an de marto forpasis nia Frato kaj Amiko, Tibor PAPP. Nekrologon vi povas legi sur la paĝo 47.*



## Financa Raporto de KELI 2002 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2001 | 2002 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 287,98 | 434,66 |
| | PB-Kapitaalrekening (3%) | 11.935,18 | 13.859,52 |
| | PB-Rentumatesto (4%) | 18.151,21 | 18.151,21 |
| | UEA-konto kelk-p | 1.571,95 | 1.010,24 |
| | Kasista kaso | 51,64 | 30,55 |
| | E-Misio, Laiconas | 0,00 | 411,43 |
| | Monrimedoj | 31.997,96 | 33.897,61 |
| | E-Misio, 4% prunted. K.Leja | 939,41 | 0,00 |
| | Kuranta konto K. Leja | 3.218,03 | 2.431,48 |
| | Pavel Polnický, EB | 51,57 | 74,47 |
| | | 4.209,01 | 2.505,95 |
| | Stokoj (libroj) | 347,66 | 335,52 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,60 | 211,70 |
| | | 559,26 | 547,22 |
| | Transitaĵoj | 285,88 | 402,00 |
| | Aktivoj sume | **37.052,09** | **37.352,78** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 3.898,14 | 3.894,06 |
| | Saldoj negativa/positiva | **935,21** | **993,77** |
| | Kapitalo entute | 4.833,35 | 5.827,27 |
| | Dumvivaj membroj | 2.746,81 | 2.682,75 |
| | E-Misio | 6.890,18 | 7.916,71 |
| | Helpa Kaso | 2.795,37 | 2.298,37 |
| | Junulara helpa Kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa reserva Kaso | 1.871,88 | 1.826,88 |
| | Literatura/Himnara Kaso | 12.427,86 | 12.427,86 |
| | Informada/Varbada Kaso | 54,72 | 54,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Fondusoj entute | 31.662,07 | 32.082,54 |
| | Kreditoroj | 287,22 | 345,08 |
| | Transitaĵoj | 269,45 | 37,30 |
| | | 556,67 | 382,38 |
| | Pasivoj sume | **37.052,09** | **37.352,78** |

## Rezulto 2002 kaj buĝetoj 2002, 2003 kaj 2004
## (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2002 | Rezulto 2002 | Buĝeto 2003 | Buĝeto 2004 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto | 4.200 | 3.846,98 | 4.000 | 4.200 |
| Perantoj | 20 | 17,00 | 30 | 20 |
| Revukostoj | 4.220 | 3.863,98 | 4.030 | 4.220 |
| | | | | |
| Prezidanto | 30 | 0,00 | 30 | 30 |
| Sekretario | 60 | 56,43 | 60 | 60 |
| Redaktoro | 120 | 120,00 | 120 | 120 |
| Kasisto/Matrikulisto | 90 | 60,39 | 80 | 80 |
| Estrarbulteno | 30 | 0,00 | 15 | 15 |
| Estrarkostoj | 330 | 236,82 | 305 | 305 |
| | | | | |
| UEA-kotizo | 50 | 50,00 | 50 | 50 |
| Ĉambro de Komerco | 35 | 32,57 | 35 | 35 |
| Kaskontrolo | 30 | 35,10 | 35 | 35 |
| Bankkostoj | 35 | 20,08 | 30 | 30 |
| Merituloj | 35 | 50,00 | 35 | 35 |
| UK Lukostoj | 90 | 0,00 | 90 | 100 |
| Ĝeneralaj kostoj | 275 | 187,75 | 275 | 285 |
| | | | | |
| Librovendado (kostoj) | 100 | 12,18 | 50 | 50 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 25 | 0,00 | 25 | 25 |
| Rabatoj de Perantoj | 25 | 18,60 | 25 | 25 |
| | 150 | 30,78 | 100 | 100 |
| | | | | |
| **Elspezoj entute** | **4.975** | **4.319,33** | **5.150** | **4910** |
| | | | | |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 4.000 | 3.647,63 | 3700 | 3600 |
| Kotizpagdiferencoj | 10 | -46,13 | 10 | 10 |
| Librovendado | 200 | 0,00 | 100 | 200 |
| Kotizoj entute | 4210 | 3.601,50 | 3810 | 3810 |
| | | | | |
| Rentumoj | 700 | 1.017,25 | 800 | 800 |
| Adopta Kaso | 900 | 694,35 | 700 | 700 |
| | 1.600 | 1.711,60 | 1500 | 1500 |
| | | | | |
| **Enspezoj entute** | **5810** | **5.313,10** | **5310** | **5310** |
| | | | | |
| **Saldoj** | **835** | **993,77** | **600** | **400** |



## KLARIGOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA BILANCO 2002-12-31

### Aktivoj

E-Misio, Laiconas — La sveda sekcio donacis al Erikas Laiconas tiun sumon misicele. KELI librotenadas la monon.
PB-Rentumatesto (4%) — fiksdata ĝis 31.12.2002 (PB = Postbank NL); ek de 11.2.2003 la mono estas sur la konto Kapitaalrekening.
E-Misio, pruntaĵo (4%) — al K.Leja, repagita en 2002.
Kuranta konto K.Leja: — Pro antaŭpago por DR fine de 2002 iomete pli alta ol duonjara antaŭpago.
Pavel Polnicky, EB: — Li ricevis monon por sendado de Estrara Bulteno, sed mankas prizorganto.
Stokoj: — Sanktaj Biblioj (8), Novaj Testamentoj (broŝ. 73), Novaj Testamentoj ... bind. 29), Evangelioj laŭ Johano (277), Adoru Kantante (10), Nia historio (6)
E-Misio kasedoj: — Dimanĉa koncerto (73)
La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.
Transitaĵo: — Rentumo el Kapitaalrekening 2002 estas 368 EUR (ricevota en 2003)
" " Rentecertificaat " " 34 EUR ( " " )

### Pasivoj

Kapitalo: — Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj
Saldo positiva: — Pro nia kotizaltigo en 2002 nun daŭros la positiva saldo.
Dumvivaj membroj: — Unu nova dumviva membro.
E-Misio: — La kapitalo kreskis pro repago de la pruntaĵo.
Helpa kaso: — Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. En 2002 ni helpis al 8 gefratoj.
Kreditoroj: — Hungara kaso 237,33 EUR (Iren Bagi), Brita kaso 107,75 EUR (Diana Richardson)
Transitaĵoj: — Sekretariaj kostoj 37,30 EUR (pagota en 2003)

## KLARIGOJ PRI LA REZULTO 2002 KAJ LA BUĜETOJ 2003/2004

Kotizoj pagendaj de ....

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Membroj individuaj | 177 | (187) | Nuraj abonantoj ... | 30 (25) |
| Membroj familanaj | 17 | (18) | IKUE-abonantoj . .. | 18 (16) |
| Membroj subtenantaj | 5 | (5) | | 48 (41) |
| Membroj dumvivaj | 25 | (30) | | |
| Membroj adoptitaj | 153 | (166) | | |
| | 377 | (406) | | |

Malkreskas la membraro, grandparte pro maljuniĝo.Tamen ni estas vivanta, ni ja ankaŭ gajnis novajn membrojn/abonantojn.

Librovendado: Ni nur donacis librojn kaj ne havis enspezojn. La elspezoj tiurilate estas ilia valoro el la Aktivoj. En 2003 ni mendas ĉe la Brita Biblio-Societo 500 Bibliojn (inkluzive de la Duakanonaj Libroj).

Adopta Kaso:
Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui „laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto).
Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2002 ni ricevis:
**Kotizojn:** hungaraj 125,00, polaj 48,90, ĉeĥaj 120,00 EUR
**Donacojn:** usona KELI-sekcio 34,00, brita ... 118,99, finna ... 70,00, nederlanda ... 32,60
Pimenides (BR) 21,50, van Iperen (NL) 48,00, Puijenbrok (CH) 45,23,
Yamada (JP), Hengstmengel (NL), Krüger (DE), Hofmann (DE)
. . . sume 30,13 EUR

Saldoj 2002, 2003 kaj 2004: Estas kaj estos pozitiva pro nia kotizaltigo en 2002.

Heilbronn, 2003-04-23 **Siegfried Krüger**, kasisto

## Rusa eldono aperis

En Kaliningrad (Königsberg) aperis la rusa eldono de la libro el la plumo de D-ro Ulrich MATTHIAS „Esperanto — la nova latino de la eklezio". Ĝi havas la titolon *„Christianstvo i Esperanto"* (kristanismo kaj Esperanto).

Kompare al la originala eldono kaj ties tradukoj en Esperanto kaj la angla, nova kroma ĉapitro traktas la rilaton de Esperanto kaj la ortodoksa medio, kiun verkis Adolf BURKHARDT; do tiu ĉapitro aperis nur en la rusa traduko.

La ortodoksa eklezio ĉiam rilatis tre rezerviĝeme al la ideo de la internacia lingvo; en ĉiu erao, sub la caro, dum STALIN kaj post la politika turniĝo, oni suspektis ne deziratajn okcidentajn influojn. Des pli gravas scii, kion dokumentas la aldona ĉapitro — ekzemple pri la tre bone vizitata Diservo en la katedralo de Varna apud la Nigra Maro okaze de la Universala Kongreso; tiam predikis Adolf BURKHARDT, dum ĉefcelebris la pola profesoro BIEDULSKI, iama fakultata kolego de papo Johano Paŭlo II, post kiam la loka metropolito inaŭguris la Ekumenan Diservon en pra-slava eklezia lingvo.

## Solvo de la krucvortenigmo 838

**horizontale**: 1. konsekri, 7. LZ, 8. al, 9. en, 10. albo, 12. rano, 14. pre, 16. nuk', 17. kion, 18. relo, 20. te', 21. la, 22. pi, 23. ordinato.

**vertikale**: 1. klarneto, 2. oz, 3. salo, 4. Elb', 5. re, 6. incendio, 10. ankr', 11. opio, 13. Au, 15. RO, 17. klan', 19. Eli', 22. Pt.

**kromsolvo**: konsento

## Raporto pri la sveda KELI-sekcio

La sveda KELI-sekcio havis sian jarkunvenon la unuan de marto 2003 en Stokholmo.

Ni eluzis la okazon kanti kelkajn kantojn el la internacia esperantohimnaro „Adoru", nome la numerojn 567, 754 kaj 371.

La jarkunveno elektis jenan estraron:
Mats LANDFORS, prezidanto,
Agneta JÄRLSTRÖM, sekretariino,
Bengt-Olof ÅRADSSON, kasisto, kaj
Leif NORDENSTORM, anstataŭanto.

En la nomo de la estraro la prezidanto esprimis dankon al Arne LUNDKVIST, kiu nun post multjara kasista laboro transdonis la kasistecon al Bengt-Olof ÅRADSSON.

Dum la pasinta jaro mortis tri el niaj membroj: Ruth GULLBERG, Lennart SVENSSON kaj Siri SJÖSTEDT. Komence de ĉi tiu jaro ni eksciis, ke ankaŭ mortis la internacie tre konata sveda KELI-ano Stig KINNANDER.

La jarkunveno decidis anstataŭigi la ĝisnun presitan „Membrofolion" per pli simpla membrocirkulero.

Ni ankaŭ decidis, ke la venonta jarkunveno de sveda KELI okazu kunlige kun la kongreso de la Sveda Esperantofederacio en 2004.

M. LANDFORS

## Korespond-petoj

Kolektanto pri Esperanto deziras korespondi :

Ernest Tews
Os. Włókniarzy 5/18
PL-58-260 Bielawa 1
Pollando



## Nekrologo
## Stig KINNANDER, Tibro.

Nia tre estimata membro de la sveda sekcio de KELI, Stig KINNANDER, mortis la 20an de januaro 2003 post longa tempo de kancero. Li naskiĝis la 15an de julio 1915 en Stockholm sed translokiĝis frue kun la gepatroj al Tibro.

Post kiam li trapasis Pålmans komerca instituto li estis komerca asistanto.

De 1942 li estis ĉefo de la ICA Butiko en Tibro.

En la misia komunumo li estis membro de la junulara asocio kaj ekde 1962 membro de la komunumo. En la esperanto-movado li estis membro de la Sveda Esperanto-Asocio kaj ĝia sekcio de KELI ek de 1961. Kiel estrara membro de nia sekcio li funkciis 1983 ĝis 2000.

Stig respondis por 27 veturadoj al Pollando kun nutraĵoj kaj medikamentoj.

Al Estonio li veturis dufoje. Kiam li estis sana, li partoprenis ĉiujn kongresojn. Li kolektis infanajn desegnaĵojn kaj aranĝis ekspoziciojn de ili.

La funebra ceremonio okazis en la misia preĝejo de Tibro la 30an de januaro. La oficianto estis pastro Bengt KINDBOM. Li estas funebre suferata de la filino Ulla Fritzon kun edzo, infanoj kaj genepoj, Tibra Misia Asocio, Sveda Esperanto Asocio kaj ĝia sveda sekcio de KELI. Al lia memoro estis meso en Krościenko, Pollando.

Arne LUNDKVIST

## Adiaŭo de Tibor PAPP

Ni funebras nian membron, amikon Tibor PAPP. Li forpasis abrupte la 8an de aprilo pro pulmoembolio.

Li naskiĝis en Debrecen la 23an de junio en 1947. Esperantiĝis en 1968. HEA membro de 1974. C-ekzameno en 1977, ŝtata supera lingvoekzameno 1993. HEA komitatano ekde 1977, prezidiano dum kvar jaroj ekde 1990. E-sekretario de departemento Hajdu-Bihar inter 1975 kaj 1999, sekretario de ORE kaj redaktis la dek lastajn n-rojn de ĝia periodaĵo „La Mevo".

Fondinto-redaktoro kaj eldonanto de „Debrecena Bulteno" ekde 1980. Multaj tradukoj, ankaŭ en HUNGARA ANTOLOGIO (1983), kaj ĉefe en DB. Li tradukis pli ol 20 memstarajn librojn (poemaron, novelojn, fabelojn, religiaj-historiojn).

Li instruis E-on ekde 1997. En la jaro 2000 la nombro de liaj gekursanoj superis milon.

Distingoj: „Honorsigno de HEA, „Pro Esperanto". Amiko Tibor aniĝis al la Societo Kalocsay en 2001, kaj en DB sub titolo „Kalocsay Klubo" li aperigis poemojn kaj poemtradukojn de la nomdonanto.

Kun la forpaso de Tibor Papp mortis ankaŭ la „Debrecena Bulteno", en Hungario la ununura gazeto literatura. Ni priploras ankau ĝin.

Sinceran kondolencon al la funebranta familio en la nomo de la Amika Societo de K. Kalocsay

Ada CSISZÁR

fonto: *Heroldo Komunikas*

# EN UNUA SUNBRILO...

## (La matena preĝo — memore al la tago 11a de septembro 2001)

(1) En unua sunbrilo en oro
ni jam preĝas kun hejmfamilio, —
laŭdi Vin, la kreanto kaj Dio,
en jar-ĉia — unua taghoro!

(2) Dank' al Vi por tiu dono:
viv' la plua hejm' kaj pano!
Ankaŭ por ĝisnuna bono
De grac-plena Via Mano!

Ho, Kompatema Dio,
Vi por pekuloj Esper',
Pardonu nin — pro ĉio
Kontraŭ la amo kaj ver'!
Pro ĉiuj pekoj de ni —
Ni tre bedaŭras, ho Di'!

Ni pruvos tion per ago
Dum ĉiu sekvonta tago:
Laboro, en Via nomo,
Por bon' de l' alia homo! —

Ni petas pri plua graco,
Nun-ĝuste — pri kora paco:
Per lerno bonon transdoni,
Kapablo el kor' pardoni!

(3) En Patruj' kaj sur la Tero
regu paco kaj libero;
en socio — justa ordo,
toleremo kaj konkordo;
sed neniam — la envio,
ĉar ĝi estas kontraŭ Dio!

Pli gravu ĉiam — la homo
Ol la objekt', eĉ tekniko —
Samkiel ne gravu mono
Antaŭ: vi — kiu en psiko?!

Ho Dio, preĝante necesan benon -
Samtempe promesas mi fortan penon:

Ke ne baru gentojn — plu akvoj, montoj —
Ligu — konstruotaj — Amo-pontoj!

(4) Monoteisto, sciu vi pri tio:
Ĉiuj ni kredas — je la Unu Dio!
Do en la Nomo de l' Sama Laŭdato —
Kreintan homon — ni rigardu frato!

Kaj sole tiam la Glob-loĝantaro
Ĝuos la Pacon trans montoj kaj maro!

(5) La kvinrond-kolora Olimpika
standardo
el Ateno ni vokas al ago kun ardo!

Ni prenos — al la homo el standarda rondo —
ŝirmi homan dignon kaj rajtojn en la mondo!
Ke — kiel en la sporto — la homa valoro
nenie plu dependu de l' haŭto-koloro!

(6) La mondon en Graco tenu,
Ho Granda la Patro-Dio;
Nin vidu, gardu, kaj benu
en Patruj' kaj familio!

(7) Kaj ni kristanoj petegas unutone,
preĝante, —
ke Kristo povu en ni esti persone!
Konstante!

Ke povu iam la homo
loĝi en Dia Sav-domo!

Wiesław TOMASZEWSKI
Varsovio, la 11an de septembro 2002